

O BRASIL ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

Número 97-99 (383-385)

Telegrafa adreso: ESPERANTOLIGO

Janeiro-Março 1946

Redator responsável:
Dr. Carlos Domingues
Telefone — 42.4357

Administração e redação:
Praça da República, 54-sob.
Rio de Janeiro. Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15
respondukuponoj.

Lia Ekscelenco Generalo Eurico Gaspar Dutra naskiĝis en Cuiabá (Kujaba), Ŝtato Mato Grosso, la 18an de Majo 1885.

Li soldatiĝis 17-jara; iĝis oficiraspiranto, 23-jara; estis promociita al subleŭtenanto, 25-jara; al leŭtenanto, 31-jara; al kapitano, 36-jara; al majoro, 42-jara; al sub-kolonelo, 44-jara; al kolonelo, 46-jara; al brigada generalo, 47-jara; al divizia generalo, 50-jara.

Dediĉita al sia kariero, li ĉiam konstante studadis la militajn teknikajn aferojn, ekde la unuaj rangoj, perfektigante siajn konojn kaj serĉante orienti siajn kamaradojn.

Li sekvis la kurson de la Milita Staba Lernejo, kun distingigaj aproboj en ĉiuj ekzamenoj. Farinte la kurson efektivigitan de la Milita Franca Misio li konkeris la unuan lokon el ĉiuj kursanoj.

Nomita Ministro por la Militaj Aferoj, per dekreto de 5-Decembero 1936, li, inter aliaj aferoj, pligrandigis la produktaĵojn de niaj militaj fabrikoj, organizis novajn specialigitajn lernejojn, stimulis la perfektigan instruadon de ĉiuj rangaj militistoj, influis al la preparo de novaj specialigistoj (profesiaj fakuloj), konstruis modernajn instalaĵojn, k. c.

Decembre 1945 li estas elektita prezidanto de la Respubliko, per memorinda tutlanda balotado, en kiu li ricevis la voĉdonojn de milionoj da brazilanoj, kiuj tiel rekonis lian kapablecon direkti kaj estri sian patrujon.

La brazilaj esperantistoj, kiuj jam havis de lia Ekscelenco Generalo Eurico Gaspar Dutra simpatian kaj apo-



Lia Ekscelenco
Generalo EURICO GASPAS DUTRA
Prezidanto de la Brazila Respubliko

gon al la Xa Brazila Kongreso de Esperanto, fidas al lia kapablo, pri la

sukceso de lia paca kaj progresema regado.

La unua pacjaro

La unua jaro post longa mondmilito estas malproksime de la restarigo de la vivo, ĉar milito havas sian teruran akompananton. Financoj kaj ekonomio de la mondo estas malorganizitaj; tutaj landoj restas okupitaj; la transportado kaj poŝto-servoj ne estas ankoraŭ regulaj; la produktado ne estas sufiĉa kaj nur post longa laboro ĝi denove atingos sian ordinaran nivelon; pakontraktoj ne estas subskribitaj. Nur parte ĉesis la malfeliĉegoj de la dua mondmilito. Post kvin jaroj de grandskala detruado, la mondo bezonas dek jarojn por rekonstruado kaj reordigo de la aferoj. Ĝis nun la teritorioj de Germanujo, Polujo, Japanujo ne revenis al la esperantista movado, kaj en tiuj landoj ni havis iam grandan Esperanto-Movadon.

Nur parte 1946 estas la unua pacjaro, sed la sukcesoj de Esperanto dum tiu mallonga tempo jam montras al ni tute klare, ke la esperantistoj estas pli bravaj ol la mondo povus opinii. Ĉie refloras la movado. Neniu samideano perdis la fidon je pli feliĉa mondo. Eĉ en okupitaj landoj, sub mortdangero, niaj amikoj kuraĝe laboradis kaj defendis nian ideon, riskante sian propran vivon. Neniu perfidis la aferon pro timo de danĝero. Ĉiuj restis fidelaj kaj faris ion por helpi la movadon aŭ konservi semojn.

La petskribo prezentota al la Unuigitaj Nacioj trovas ĉie entuziasmon kaj vekas intereson en niaj rondoj. I.E.L. ricevas amasojn da novaj aliĝoj kaj jam atingis ciferojn pli altajn ol antaŭ la milito. Gazetoj reaperas kaj komencas sian mision ligi cerbojn kaj korojn de la batalantoj. Novaj libroj venas el diversaj lokoj. Kian misteran forton havas tia malgranda armeo disemita tra la mondo!

La mondo ne povas kompreni nian forton, ĉar ĉi tiu estas nevidebla ligo de homoj malproksimaj unuj de aliaj, tamen ligitaj inter si per la mistera forto de la vorto, de komuna lingvo. Sankta Johano pravas, kiam en la komenco de sia Evangelio li diras: "En la komenco estis la Vorto..."

D-ro Zamenhof antaŭ 38 jaroj diris en la Dresdena Kongreso: "Neniu el ni havas la rajton esti fiera, ĉar ni aparte, sed ĝi estas nur la rezultato de multejara pacienca laborado de multo da personoj."

Ja, la firma progresado de nia afero estas rezultato de multejara pacienca laborado de multaj personoj ligitaj inter si mondscale per komuna lingvo.

Se ni ne posedus komunan lingvon por konscii pri la laboroj de niaj samideanoj tra la tuta mondo, per leteroj, gazetoj, libroj; se ĉiu el ni scius nur pri la klopodoj de siaj samlingvanoj kaj ne povus doni kaj ricevi helpojn el aliaj landoj, certe jam de longe nia movado estus malaperinta de sur la tero. Sed ni jam posedas tian miraklan instrumenton. Ni povas ellerni per la samaj libroj; legi la samajn gazetojn; interŝanĝi pensojn kaj ideojn per leteroj kun ĉiuj niaj samideanoj de la mondo; tial ni estas spirite kunligitaj por la komuna afero kaj tia kunligiteco donas ni la eblecon kunlaboradi en perfekta harmonio eĉ se niaj privataj konvinkoj ne estas identaj pri diversaj aliaj temoj.

Nur dank'al posedo de komuna lingvo en plena uzado ni ja estas konsciaj pri la spirita forto de nia movado kaj konservas nian fidon dum la malfacilaj tempoj. La Esperanto-Movado estas nun la sola mondmovado kiu posedas tian magian instrumenton de laboro, tian misteran kunlaborilon, kia estas komuna mondlingvo por ĉiuj membroj de la movado.

Ekzistas multaj aliaj mondmovadoj pli fortaj ol la nia, sed neniu el ili posedas la nevenkeblan konvinkon, la spiritan harmonion, la firman kunlaboradon de la nia, ĉar ili ne posedas komunan lingvon egalrajtan por ĉiuj kunlaborantoj disemitaj sur la terglobo.

La unua pacjaro permesas al ni pli unu fojon konstati nian forton rezultantan de la posedo de komuna lingvo por ĉiuj. Ni estas nevenkeblaj, ĉar ni jam posedas la necesan instrumenton por ke nia movado estu ne nur nome, sed fakte, mondmovado.

La Internacia Helplingvo-Esperanto denove alvenas por ĝia paca batalego, revigita kaj vivplena, speciale en Anglujo, Mez-Eŭropo kaj Skandinaviaj landoj ankaŭ tre bonaj, raportoj estas ricevitaj el Brazilo.

Sukcesaj raportoj ankaŭ alvenas el Ĉinujo, Sovetio kaj el Okcidenta Azio — kaj Kalifornio ne fariĝos escepto. La Oktobra kunveno de la Esperanto Klubo de Los Angeles estis unu el la plej sukcesaj dum la historio de la Klubo. Novaj oficistoj estis elektitaj, kaj urbkonsilanto Parley Parker Christensen, estis envarbita kiel prezidanto. Li akceptis la oficon kondiĉe ke aliaj agemuloj lin helpu konduki la aferojn de la Klubo, ĉar la devoj de urboficio jam tro multe okupas lin.

S-ro Christensen ankaŭ jam aranĝis la parolon kaj diskuton en la Publika Librejo de Los Angeles jaŭde vespere, la 29an de novembro, 1945, je la horo 19:30 pri la temo "La Revivigo de Entuziasmo pri Esperanto Agado tra la Tuta Mondo."

Oni ankaŭ faras preparajn arangojn por Esperantaj lecionoj en diversaj vesperaj lernejoj de la urba lerneja sistemo kaj ankaŭ en la privataj hejmoj.

ĈE LA SOJLO DE LA 60a JARO

En la 14a de Julio 1946 finiĝas la 59a jaro post la apero de la "Unua Libro" kaj komenciĝas la 60a jaro de nia paca batalado.

Rigardante malantaŭen ni konstatas, ke la unuaj pioniroj jam malaperis, sed ilia penado konstruis ion nedetruoblan por la homaro. La movado neniam estis tiel vigla, tiel forta kiel nun. La saman fervoron de la unuaj batalantoj ni vidas en la junaj esperantistoj de la 60a jaro de nia movado.

Kiom da novaj projektoj, kiom da skismoj aperis dum tiuj jardekoj, sed neniu prosperis, dum Esperanto venkas ĉiujn barojn, ĉiujn malhelpojn. Du mondmilitoj ŝanĝis multajn konvinkojn, ŝancelis la homan civilizacion, sed ne hezigitis niajn samideanojn.

Ni trankvile eniras en la 60a jaron.

Tra la tuta mondo oni ricevas nun subskribojn por petskribo prezentota al la Organizaĵo de la Unuigitaj Nacioj. Eble post mallonga tempo la Registaroj enkondukos la instruadon de nia lingvo en la lernejojn de multaj landoj; sed se la Registaroj nenion faros, ni daŭrigos senĉese nian pacienca laboron, ĉar ni scias, ke ankaŭ per nia privata laborado ni venkos la indiferentecon de la mondo.

La malfacilaj tempoj jam forpasis. Nun ni jam estas sufiĉe multaj por eldoni niajn proprajn librojn kaj gazetojn; sekve, iom post iom ni atingis staton de matura estaĵo, kiu perlaboras sian propran vivon. Tre baldaŭ Esperanto estos kultura lingvo pli forta ol multaj lingvoj de malgrandaj nacioj, kaj povos kun profito eldoni gravajn verkojn pri ĉiuj temoj por tutmonda disvendado. Kiam ni atingos tiun turnpunkton — kiam libroj en Esperanto vendiĝos pli ol en lingvoj de malgrandaj popoloj — nia celo estos trafita, ĉar ni tiam posedos kulturen lingvon sufiĉe gravan por ke ĉiu inteligenta homo en la mondo devu lerni kaj uzi ĝin. Tiam ni povos atendi la Registarojn dum jarcentoj aŭ jarmiloj. Kaj tiu turnpunkto estas tre proksima. Ĝi estu nia unua celado!

ILEPTO

(Internacia Ligo de Esperantista Poŝt — kaj Telegraf-oficistaro) informis, ke ĝi denove funkcias. Ĉiuj svedaj poŝt-kaj telegraf-oficistoj esperantistaj estas petataj interrilati kun la ĝenerala sekretario de ILEPTO. S-ro Robert Filliâtre, Acheres (S. et O.), Francujo.

(El "Svenska Esperanto-Tidningen")

VOĈO EN LA MONDO

Tiu ĉi artikolo estas originale verkita en la angla lingvo kaj aperis en "Quest" en Februaro 1936. En kondensita formo ĝi aperis en "Global Thinking" de Sept-Dec. 1945. Tiun ĉi tradukon de la kondensaĵo la eminenta Aŭtorino mem korektis kaj afable permesis al ni publikigon.

Hodiaŭ estas neniu anguleto en la terglobo, kien voĉo de iu alia parto de la mondo ne povus penetri kun la sama rapideco kian havas la lumo. Kaj tio ne estas ĉio: la voĉo povas kovri samtempe la tutan globon. Ĉiuj posedantoj de ricevilo sciantaj ĝin agordi povas aŭdi tiun voĉon en la sama momento. Ĉiuj povas ja aŭskulti, sed ĉu ĉiuj komprenos?

Radio venkas la spacon kaj superas landlimojn, sed lingvaj baroj nuligas ĝin plej altan utilecon. Radio estas esence internacia, tial ĝi bezonas internacian lingvon, lingvon de simpla strukturo, precizan, facile lerneblan kaj sen kaŝitaj antaŭjuĝoj kaj miskomprenoj pri la senco de ĝiaj vortoj. Sed tia ne povas esti nacia lingvo. Tia ne povas esti la lingvo de unu nacio por esti uzata de ĉiuj nacioj, sed ĝi devas esti nova produkto, scienca invento por la uzado de ĉiuj homoj, lingva instrumento por la homaro.

La uzado aŭ penado uzi nacian lingvon kiel internacian helplingvon reunkontas grandajn ĝenojn kaj eĉ danĝerojn.

Kiam homo parolas sian nacian lingvon, ĝi donas al li efektivan superecon kaj senton de aŭtoritateco rilate al fremda aŭskultanto, sed la roloj tuj ŝanĝiĝas kiam la fremdulo ekparolas sian gepatran idiomon.

La revo pri taŭge konstruita lingvo jam ne estas ĥimero. Bazo por tia lingvo ekzistas. La praktika uzado de Ido, Esperanto, Occidental kaj aliaj atestas tiun eblecon. Ili ĉiuj havas multajn komunajn trajtojn — simplan strukturon kaj vortaron ĉerpitan el la Indo-Eŭropaj lingvoj. Ili estas tiel similaj unu al aliaj ke parolanto de unu rapide lernas kompreni la aliajn. Unu el ili, Esperanto, estas tiel larĝe disvastigita, ke kelkaj personoj plensukcese faris la provon ĉirkaŭiri la mondon uzante nenium alian lingvon.

Kelkaj el la uzoj de tiel konstruita lingvo kaj la avantaĝoj de ties funkciado povas esti klarigitaj per la uzado de Esperanto en pluraj malsamaj kam-

ALICE VANDERBILT MORRIS

poj. Ekzemple, en internaciaj konferencoj. Mi ĉeestis kvar el la jaraj Mondkongresoj de Esperanto, en Genevo, Antverpeno, Dancigo kaj Parizo. Dum tuta semajno homoj el pli ol tridek landoj faris paroladojn, diskutis vigle en publikaj kunvenoj, kaj familie interparolis dum ekskursoj kaj festoj, uzante Esperanton kun malpli da diferenco de elparolo ol ekzistas inter usonanoj naskitaj en Maine kaj Texas. Mi renkontis eĉ diversajn parojn feliĉe geedzigitajn de pluraj jaroj, kies amo naskiĝis en Esperanto, ĉar unu ne sciis la nacian lingvon de la alia kaj ili daŭrigis uzi Esperanton kiel sian hejman lingvon.

Mi aŭdis en Esperanto prelegojn de membroj de diversaj nacioj. Mi vidis ke ĉiu sentis sin hejme. Tiel strange kaj samtempe tiel nature tio ŝajnis, ke mi deziris koni la impresojn de tiuj kleruloj kaj specialistoj pri tiu uzo de artefarita lingvo. Mi pridemandis homojn de ĉirkaŭ dek patrinlingvoj. Ili ĉiuj estis lertaj en la uzo de diversaj lingvoj por publikaj paroladoj, kaj ĉiu el ili havis duoblan impreson en la uzado de Esperanto. Unue, ĉiu havis la senton de majstreco kaj sekve estis libera de embaraso, ĉiu konfesis ke, prelegante en nacia lingvo krom sia propra, kvankam tre bone konante tiun fremdan lingvon, li neniam estis tute certa pri la uzado de la idiotismoj kaj ĉiam estis tre certa ke lia prononco sonis "fremde". Due, redaktante siajn pensojn en Esperanto, ĉiu spertis specialan kontenton (iuj nomis tion "mensa ĝuo") en la precizeco de la lingvo, en ĝia sistemo de vortkonstruado, en ĝia logika simetrio, kaj en la simpleco de ĝia strukturo en komparo kun naturaj lingvoj.

En tiuj kongresoj la venko kontraŭ la lingvaj baroj estis vera beno, ĉar ne estis la teda tempoperdo en tradukado, perdo de valora tempo, kiun ĉiu deziris uzi por rekta interŝanĝo de ideoj; beno ankaŭ, ĉar la sola lingvo uzata ne donis al membroj de iu el la grupoj la tre konsiderindan avantaĝon paroli en sia patrinlingvo.

Oni ofte malatentas la faktan utilecon de la uzo de Esperanto kiel tradukilo de unu etnika lingvo en alian. Internacia organizo, ĵurnalo, individuo, deziras ke iu artikolo aperu en lokaj

gazetoj de diversaj landoj. La aŭtoro tradukigas la artikolon en Esperanton. Dum la tradukado iuj malklaraĵoj en la originalo elstaras kaj estas korektitaj. Oni sendas la Esperantan tekston al agentoj en 18 landoj, ĉiu el tiuj agentoj estas bonstila en sia nacia lingvo kaj lerta esperantisto. Ĉiu agento tradukas la tekston en sian hejman lingvon kaj la tradukaĵo estas publikigita.

Mi mem havis rimarkindan sperton en tiu senco, kiam mi kunvenis en Parizo kun diversaj alilandaj amikoj por redakti provon de memorando pri tempo por kiu ni serĉis interkonsenton. La unua provo estis en angla kaj franca lingvoj. Kiam ni diskutis ĝin, kvankam plenaj de la plej alta bonvolemo, nin sieĝis la sento, ke la vortoj ne estis same komprenitaj de ĉiuj. Post unu horo de senfrukta diskutado, franco diris al ni: "Ni metu ĝin en Esperanton". Tion ni faris. En tiu lingvo sen idiotismoj, ni estis devigataj esprimi precize niajn pensojn. Ni atingis klarecon. Tiam ni povis inteligente diskuti la temon kaj estis facile redakti la dokumentojn en angla kaj franca lingvoj, ĉar ambaŭ tekstoj baziĝis sur la originalo en Esperanto.

Kun tiu noto de espero antaŭ niaj okuloj, permesu al mi citi el parolado en la lasta Tago de Kolumbo (1) farita de la Usona Ambasadoro en Belgujo tra vasta reto de radio-stacioj organizita de la Brusela Ekspozicio. Li parolis pri la neceso de mondlingvo kaj konkludis jene:

"Hodiaŭ ni festas la eltrovon de Ameriko. Ĝi estas naskiĝa datreveno. Ni faru ĝin ankaŭ inaŭgura tago, tago en kiu naskiĝas la rezolucio tiel reklami por la postulo por artefarita mondlingvo, ke la registaroj de ĉiuj civilizitaj nacioj atentu kaj ekagu, la rezolucio, ke devas esti instruata en la lernejoj de ĉiu lando ne nur la amata patrinlingvo por esprimi, kiel nur ĝi povas, la animon de sia popolo — milo da etnikaj lingvoj, se oni deziras — sed samtempe simpla artefarita dua lingvo, mondlingvo por ĉiuj, por rekta interkomuniko de la tuta homaro."

(1) Tago de Kolumbo estas la 12a de Oktobro, festata en ĉiuj landoj de Ameriko, ĉar en la 12a de Oktobro 1492 Kolumbo eltrovis la Novan Mondon. — La Tradukinto.

“Faire face”

“Faire face” é o título da revista dos paralisados na França. O último número traz um artigo sobre o Esperanto. Oferecemos aos paralisados ensinar-lhes gratuitamente a língua internacional, por correspondência. Este apêlo provocou uma enorme quantidade de respostas. Quanta esperança provocámos! De todos os cantos da França, paralisados escrevem-nos: “Sim, eu desejo aprender o Esperanto, para poder corresponder com os estrangeiros, para arranjar amigos por todo o mundo! Estou tão isolado...”

A maior parte de nossos correspondentes compõe-se de jovens; qualquer trabalho é-lhes em geral interdito; eles têm tempo de ler, de escrever, de estudar, de pensar.

Nós, que nos queixamos de que a vida passa demasiado depressa, de que não temos tempo, pensemos neles, e não nos lastimemos.

⊕ Esperanto trará uma diversão à monotonia de sua existência. Amigos desconhecidos, longínquos, lhes falarão de outros céus, de novos costumes, eles poderão trocar idéias, revelar sua personalidade, discutir literatura, filosofia... sua vida se iluminará sua alma se elevará.

Talvez alguns desses correspondentes sejam paralisados, como eles. Imaginai, de um ponto a outro do globo, dois enfermos, separados por milhares de leguas de terras e de oceanos, que se tornam amigos, graças ao Esperanto, e que se dão, reciprocamente, precioso conforto moral. Tudo separa esses dois correspondentes: a distância, as fronteiras, a nacionalidade, a língua, a impossibilidade em que estão de se locomoverem... O Esperanto vence todos estes obstáculos e permite ao amor ainda não expressado do coração de um enfermo ir animar a alma de outro companheiro de infortúnio, em região antípoda da terra.

Em todos os tempos o movimento esperantista preocupou-se em proporcionar auxílio e consólo aos desfavorecidos deste mundo. Muito antes de 1914, graças notadamente aos esforços do professor Cart, o Esperanto desenvolveu-se entre os cegos.

Existem muitas obras literárias no sistema Braille, em Esperanto. Disse-me um dia um cego: “O Esperanto, para mim, é uma razão de viver”.

Os “atacados do pulmão” não foram esquecidos. Em Hauteville, em Saint-Hilaire de Touvet, na maior parte dos sanatórios, muitos jovens têm aprendido o Esperanto por correspondência, e depois o têm ensinado a seus companheiros. Nosso Serviço de Auxílios está em ligação constante com eles.

Ainda há os órfãos, os milhares e milhares de todos os países, de todas as raças, aos quais a guerra arrebatou o mais precioso dos bens: a proteção de um pai, a ternura insubstituível de uma mãe. Entre eles não há vencedores nem vencidos; são todas avesinhas que cairam do ninho.

E’ preciso ensinar-lhes o Esperanto; é necessário pô-los em relação uns com os outros, ensinar-lhes a se conhecer, a se amar. Em Lyon, com o apêlo da municipalidade, abrimos este ano um curso de Esperanto no orfanato Adolphe Favre, acolhido pelas crianças com verdadeiro prazer.

Idiotismos internacionais

Malfermi aŭ fermi kunsidon	Abrir ou encerrar uma sessão
Peti aŭ doni la parolon	Pedir ou dar a palavra
Konstrui aerajn kastelojn	Construir castelos no ar
Malviva litero	Letra morta
En la nomo de	Em nome de
Legi sur la fizionomio	Ler na fisionomia
Tagordo	Ordem do dia
Rompi al si la kapon	Quebrar a cabeça
La tago agonias	O dia está agonizando
Bapti ŝipon	Batizar um navio
Enbati ideon en la kapon	Martelar alguma coisa na cabeça
Ĉeno da montaroj	Cadeia de montanhas
Dormigi la suspektojn de iu	Adormecer as suspeitas de alguém
Tio havas dozon de poezio	Tem uma dose de poesia
Drama situacio	Situação dramática
Ebria de ĝojo	Ébrio de alegria
La ebrico de la gloro	A embriaguez da glória
Eksploro de koleró, de amo	Explosão de cólera, de amor
Esti en sia elemento	Estar em seu elemento
Perdi la fadenon en la parolo	Perder o fio do discurso
Postkuri la fantomon de la gloro	Perseguir o fantasma da glória
En la floro de siaj jaroj	Na flor dos anos
Ĉiu popolo havas sian fizionomion	Cada povo tem a sua fisionomia
Hunda vivo	Vida de cão
Reguligi la kontojn kun iu	Ajustar contas com alguém
Ĝi frapis mian atenton	Feriu-me a atenção
La flamoj lekis la tegmenton	As chamas lambiam o telhado
Lavi la manojn	Lavar as mãos
La afero sidas en bonaj manoj	A coisa está em boas mãos
Peti la manon de junulino	Pedir a mão de uma jovem
Maro da mizeroj	Mar de misérias
Alpremi iun al la muro	Levar alguém à parede
Murmuri tra la dentoj	Murmurar entre dentes
Naĝi en sangoj, en riĉaĵoj	Nadar em sangue, em riquezas
Nutri esperon	Alimentar esperanças
Malfermi la okulojn al iu	Abrir os olhos a alguém
Parenci per Adamo	Parente por parte de Adão
Rozario da mensogoj	Rosário de mentiras
Meti la finan punkton al polemiko	Pôr um ponto final na discussão
Ŝi estas nur la ombro de si mem	Ela é a sombra do que foi
Nubo da ĉagreno kovris lian frunton	Uma nuvem de pesar cobriu-lhe o rosto
Konduki iun per la nazo	Conduzir alguém pelo nariz

A. C. F.

Lançamos um apêlo aos esperantistas de todos os países, para que se abram semelhantes cursos em todos os orfanatos do mundo.

Lançamos um apêlo a todos para financiarem a fundação de “Campos de férias internacionais”, onde os melhores alunos desses cursos viriam durante algumas semanas ter contacto, tomar conhecimento com camaradas de todas as nações.

Eis como conhecemos esta “preparação pacífica”, de que falámos em artigo anterior.

“Os fundamentos da paz, declarou o sr. Attlee em Washington, residem no coração dos homens e é ensinando aos cidadãos do mundo a se conhecer entre si, a apreciar-se melhor, que os povos serão cada vez menos agitados pelas emoções que tornam possível a guerra...”

Palavras profundas e sensatas. “Ensinar os cidadãos do mundo a melhor se conhecer”, tal é perfeitamente o fim de nossos esforços, e convidamos todos os homens de boa vontade a nos darem a mão.

“K.”

(Traduzido da revista esperantista *Kompreni*, órgão da Fédération Esperantiste Rhône-Alpes, de Lyon, de março de 1946.)

C. C.

ALVOKO AL JURNALISTOJ-REDAKTO-ROJ-ESPERANTISTOJ

Ĉar nun la milito finiĝis kaj estas tempo por pli bona internacia kunlaboro, ni volas reaktivigi la kontakton inter la ĵurnalistoj-redaktoroj, kiuj sciopovas esperanton. Ni deziras ke ĉiu esperantisto, laboranta en la ĵurnalistika fako donu sian adreson por ke ni publikigu adresaron de esperantistaj ĵurnalistoj. Sciigu pri via aĝo kaj pri la gazeton en kiu vi laboras. Kiam ni havos la adresaron ni interkonsentos pri la plej efika maniero por komuna interkontakto.

Ni ankaŭ volonte akceptas proponojn diversajn pri kunlaboraj metodoj eventuale pri Internacia ĵurnalista Societo. Skribu al iniciantoj: redaktoro Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg, Svedio aŭ redaktoro Niilo Kavenius, Piiskankatu I, Turku, Finnlando.

Einar Adamson, redaktoro, Göteborg, Svedlando

Niilo Kavenius, ĉefredaktoro Unsi Päivä, Turku, Finnlando

S. M. Florence, redaktoro, The Aberdeen Press and Journal, Aberdeen, Skotlando.

Verner Ödegård, ĉefredaktoro Hudiksvalls Nyheter, Svedlando.

C. Hilmer Johansson, ĉefredaktoro, Östgöten, Linköping, Svedlando.

Victor A. Ostlund, redaktoro, Arbetarbladet, Gävle, Svedlando

Otto Pellikainen, redaktoro, Seinäjoki, Finnlando.

Amikoj, al ago!

Nun pasis de l' nokto la nigra mallum',
 Disiĝis nebulo, fantoma la fum';
 Tra l' ombroj triumfe penetras eklum',
 Kaj ĉesas jam plendo kaj plago.
 Finiĝis milito, kruela krucum',
 Al mond' sin malfermas pli ĝoja volum',
 Krepuskas aŭroro de glora plenum':
 Amikoj, jen *nia* la tago!

El koro profunda sin levas ekkri':
 Savitaj ni estas! Ho, dankon al Di'!
 Feliĉon alportas matena radi'
 Pli grandan ol eblas imago:
 Liberon kaj pacon en bela uni',
 Saviĝon el ungoj de l' sanga furi'.
 Liberan terenon do ankaŭ por ni;
 Amikoj, hej! supren la flago!

Jam flirtas de l' flago espera kolor',
 Promesas printempon pompantan je flor';
 Post vintroj senfruktaj, post frosta rigor'
 Regalas nin riĉa repago.
 Amikoj, antaŭen kun freŝa fervor'
 Al novaj sukcesoj, al vigla labor'!
 Por nia triumfo jam batas la hor':
 Amikoj, al ago! Al ago!

TEO JUNG

(El "Svisa Espero")

ĜOJIGA ERARO

Mallonga telegramo el Moskvo anoncas, ke l' aRusa Registaro enkondukis la instruadon de la angla lingvo en la porinfanajn lernejojn per tre modernaj instrumentoj.

La pacienca laborado de la esperantistoj celas precize tion, ke ĉiu infano en lernejo lernu duan lingvon flanke de sia nacia lingvo, por ke ĉiu homo en la mondo sciu komunehoman lingvon krom sia genta idioma. La elekto de la komuna lingvo ne gravas, kondiĉe nur ke ĝi estu la sama en la tuta mondo. Se ĉiuj Registaroj imitas la rusan ekzemplon kaj instruus la anglan lingvon al siaj infanoj, baldaŭ la mondo estus atinginta la idealon de la esperantistoj, ĉar ĉiuj homoj sciis mondlingvon.

Certe ne la anglan ni preferas, ĉar ĝi estas malfacilega kaj nur la plej talentaj vere posedus ĝin; sed ni ĝojas, ke la Rusa Registaro faris tiun paŝon, ĉar ĝi montras, ke la neceso de mondlingvo jam estas komprenata kaj oni penas solvi la jarmilan problemon. Sed ni pli detale ekzamenis la aferon.

Ĉu la aliaj registaroj imitos la Ruson? Supozeble ne, ĉar naciaj ŝaluzoj malhelpas la akceptadon de lingvo de

aliaj nacioj. La solvo ne estus justa, ĉar la anglalingvaj popoloj neniam klopodon devus fari por servi, sed nur ricevi servadon. Dum la filoj de ĉiuj aliaj nacioj devus perdi longan tempon en la parkerado de anglaj vortoj kaj gramatikaj reguloj, la anglalingvanoj uzus tiun tutan tempon por lerni sciencojn kaj akirus grandan sciencan superecon. Se ĝi ne kreas la samajn rajtojn kaj la samajn devojn por ĉiuj, la solvo estas maljusta kaj multaj ne akceptos ĝin. Eĉ la Rusoj iam komprenos la maljustecon kaj ŝanĝos sian decidon.

Grave estas nur, ke granda paŝo estas farita. Se en tiu paŝo estas fundamenta eraro, oni ĝin korektos en la estonteco.

La solvo justa por ĉiuj estas neŭtrala lingvo, kaj la plej perfekte neŭtrala lingvo estas lingvo artefarita, regula, tre facila kaj logika por ĉiuj, kia estas Esperanto.

La progresado de Esperanto dum 58 jaroj, sen helpo de la Registaroj, montras, ke ĝi posedas la necesajn kvalitojn por plenumi sian mision en la mondo. La Rusa eraro ĝojigas nin, ĉar ĝi plifruigas la enkondukon de Esperanto en la lernejojn.

Kristano Hagarido.

O GOVERNO DO BRASIL UTILIZA O ESPERANTO

Pela primeira vez na história, um país dirige-se aos governos estrangeiros em Esperanto!

Tão honroso papel coube ao Brasil, que mais uma vez mostrou quanta atenção dedica, através das suas instâncias oficiais, ao desenvolvimento da língua internacional auxiliar.

Por intermédio da respectiva Repartição do Ministério dos Negócios estrangeiros, o Brasil acaba de enviar a todos os governos do mundo uma brochura, impressa em Esperanto, dedicada à memória do aviador brasileiro Santos Dumont, precursor da aviação.

Esta novidade enche de júbilo os nossos corações de esperantistas e levamos a esperar ainda mais gratas notícias do lado de lá do Atlântico, onde o Esperanto caminha em frente, auxiliado e acarinhado pelas autoridades.

(Da "NATURA", Revista de Saúde e Educação Física, órgão oficial do Movimento Naturista Português, que mantém uma secção dirigida por O. Costa Júnior em e sobre o Esperanto — Redação: Rua Herois de Quionga, 22.º DT. — LISBOA. Portugal.)

GRAVA DECIDO EN KONGRESO DE HISPANA SINDIKATO

En Parizo okazis en majo 1945 kongreso de la hispana sindikato C.N.T.

En tiu kongreso oni decidis efektiviĝi, ke "la infanoj estos instruataj en la hispanaj lernejoj en la gepatra regiona lingvo kaj la hispana lingvo. Poste la unua lingvo, kiu oficiale estos instruata estos Esperanto."

LIBROJ APERINTAJ DUM LA MILITO

Ni legis en "Dansk Esperanto Blad", ke dum la milito oni eldonis en Danujo la jenajn librojn: "Kantante antaŭen", "Muzika eldono", "Tra densa mallumo", "Pri bredado de abeloj", "Eta Krestomatio", "La forto de l' Vero", "La Pastro en Vejlbj" kaj "Esperanto Laerebog". Ili estas haveblaj ĉe "Libro-servo" de Centra Dana Esperantista Ligo, Pr. Jorgensgade 4 A, Kopenhago, Danlando.

LA SKOLTOJ KAJ ESPERANTO

En 1947 okazos en Francujo mondfamboreo. Kiel ejon oni elektis vastan kampejon apud la rivero Seine, 70 km de Paris. 35.000 skoltoj 14-ĝis 17-jaraj povos partopreni. La kunveno de la esperantistaj skoltoj okazos la unuan tagon de la jamboreo.

NEKROLOGO

D-RO BENSON MORTIS

Pace, sendolore, dum trankvila dormado, nia eminenta samideano D-ro William S. Benson mortis, en sia hejmo, 1011 Grove Street, Irvington, New Jersey, Usono.

Li estis esperantisto ekde sia 10a vivjaro, ĉar li naskiĝis en 1879 kaj eklernis Esperanton en 1889. Li naskiĝis en Kiev, Ruslando, kaj enmigris en 1897 en Usonon, kie li fariĝis kuracisto kaj instruisto kaj vivis ĝis la morto.

Fervora esperantisto kaj klera membro de la Amerika Esperanto-Akademio, lia ĉefa penado dum la tuta vivo estis prepari tiajn lernolibrojn, per kiaj la lernado de la lingvo estu facila kaj agrabla. Unue li preparis 10 kaje-rojn kun la titolo "Universala Esperantistigilo" kaj ilin eldonis de 1925 ĝis 1927. Poste, li ellaboris la grandegan "Universalan Esperanto-Metodon", kun 11.000 bildoj, kaj ĝin eldonis en 1933. Tiu eminenta libro estas certe la plej kara eldonaĵo iam preparita por instrui Esperanton, kaj la Aŭtoro mem pagis la koston de la eldono.

Ne tute kontenta ankoraŭ pri la "Universala Esperanto-Metodo", li entreprenis la preparadon de alia lernolibro kun pli grandaj literoj, pli simplaj bildoj, pli klara teksto kaj laboradis super ĝi senĉese ĝis kiam la morto lin interrompis. La lasta libro ne estas finita, sed la pacienco kaj inteligento montritaj en la antaŭaj verkoj kaj la grandegaj elspezoj por ilin eldoni je propra kostopago montras al ni la altan valoron de tiu homo, por kiu Esperanto ne estis simple lingvo, sed unu el la plej gravaj sociaj problemoj de nia tempo, unu el la grandaj idealoj de la homaro.

Ni kondolencas lian familion kaj la tutan esperantistaron pro la granda perdo, kiun ni ĉiuj suferas pro lia morto, kaj esperas, ke lia nevenkebla amo al nia ideo eterne vivu kiel ekzemplo imitinda.

KORESPONDADO

Hispana esperantisto kaj grupeto el lernantoj deziras interkorespondi kun brazilanoj pri ĝeneralaj kulturaj temoj, sportrevua interŝanĝado k. t. p. Skribu al S-ro Federico Rivelles Giménez. Plaza de Tetuan, 40. CASTELLON DE LA BARCA. Hispanujo.

Por korespondi kun ĉiuj landoj, interŝanĝi objektojn. Aliĝu al la trilingva klubo "Amikeco". Petu informojn al: O. T. P. 4 str. J. C. Tissot. ST. ETIENNE. Francujo.

Esperantistas vivos e mortos

Encontramos em várias gazetas notícias de esperantistas conhecidos:

General Bastien, da França, presidente da IEL, retomou seus trabalhos no movimento Esperantista. Nossas felicitações!

Kurt Walter, último presidente da "Germana Esperantista Asocio", morreu, no posto de major, na frente oriental.

Jean Forge, polonês, residente em Berlim, autor de diversas obras em Esperanto, depois de sua libertação de um campo de concentração junto a Dresden, apareceu no rádio tcheco-slováquio.

Teo Jung, o conhecido redator de "Heroldo de Esperanto", está ainda na Holanda. Já começou a colaborar em várias gazetas esperantistas. Neste número transcrevemos uma poesia sua.

O Professor Christaller, membro da Esperantista Akademio e autor de bons dicionários de Esperanto, vive ainda em Stuttgart.

Vivem e trabalham pelo Esperanto d-ro K. Kalocsay, Totsche e J. Baghy, samideanos húngaros e de renome.

Durante o tempo em que ficaram alguns países europeus sem poder comunicar-se com o resto do mundo perdeu o Esperanto muitos amigos dedicados. Dentre eles, na França: André Baudet, vicepresidente da S. F. P. E.; Rollet de l'Isle, ex-presidente da Academia Esperantista, presidente d honra da S. E. P. E.; prof. Boucon, d-ro Foveau de Courmelles, René de Lajarte, secretário da Academia esperantista; general Matton, Charles Verax, autor da "Enciklopedia Vortareto Esperanta" e do "Vocabulaire Technique et Technologique Français-Esperanto"; Jacques Camescasse; viuva Th. Cart, Sergeant, René Beck e muitos outros.

S. Grenkamp — Kornfeld, membro de la Lingva Komitato, kaj unu el la aŭtoroj de Plena Vortaro de Esperanto, mortis en koncentrejo, en Germanujo.

Na Suíça faleceu em Outubro de 1945 Pierre Cérésolle, com 67 anos de idade, verdadeiro representante do "homaranismo", sua vida foi toda de ilimitada e constante dedicação e de trabalho pela paz, solidariedade e cooperação no campo mundial.

LA MORTO DE F-INO LIDJA ZAMENHOF

En letero de S-ro Arszemuk, Polujo, al s-ro E. Malmgren li skribas i.a.: "En la lastaj tagoj antaŭ murigado kaj fermo de la hebrea kvartalo, mi venis al fino Zamenhof, kaj mi proponis al ŝi kaŝi sin ĉe mia pola familio. Sed tiu nobla virino rifuzis mian proponon savi sin dirante, ke mi kun mia familio povus perdi niajn vivojn, ĉar kiu kaŝas hebreon, tiu pereas mem kune kun trovita hebreo. — F-ino Zamenhof estis bruligita en la mortigejo por hebreoj en Treblinka, loko inter Varsovio kaj Bialystoko".

(El "Svenska Esperanto-Tidningen")

Bibliografio

Ni ricevis kaj tre kore dankas:

"A Obra de Zamenhof", de Luzo Bemaldo — Alocução proferida na Universidade Popular Portuguesa, de Lisboa, no dia 15 de Dezembro, data do aniversário do nascimento do autor do Esperanto.

"La Forto de l' Vero", de Adi. Dansk-Esperanto-Forlag — 1945. Facila legolibreto (Romano por komencantoj). Verko, kiun oni legas facile, kun scenoj rilataj al Esperanto.

"D-ro Dorner", de H. L. Egerrup. — Dansk-Esperanto-Forlag. 1945. 1 vol. kun 208 paĝoj. La aŭtoro verkis ĉi tiun romanon samtempe dane kaj Esperante, kaj la esperanta eldono aperis unua. La bazo de tiu verko estas studo pri plivalorigo de la homaro per artefarita gravediĝo de aprobitaj virinoj, per semo de elektitaj patroj, laŭ la spertoj akiritaj dum racia bredado de dombestoj.

Ni rimarkas malĝustajon pri la insulo Madeira, kie unu el la personoj pasigis kelkajn monatojn: la parolata lingvo en insulo Madeira estas la portugala, la lingvo de Portugalujo kaj de Brazilo, kaj ne la hispana, kiel estas dirite plurfoje.

"Pensoj de Zamenhof" — Svisa Esperanto-Societo, Bern, 1945. Bela brochura, impresa em duas cores, contendo 24 pensamentos de Zamenhof, extraídos de suas cartas, discursos e artigos, cujo principal tema é de que maneira poder criar duradoura paz entre os homens. A cada pensamento, em Esperanto, seguem-se traduções em línguas francesa, inglesa, alemã e italiana. Outra edição poderia trazer também a tradução portuguesa.

Oomoto

ONISABRO DEGUČI, la posteulo de Susano "Dio de l' Tondro", kiu pro hereda rajto pretendas la japanan imperiestrecon kaj estas la ĉefo de l' Sintoisma sekto "Oomoto" kun du milionoj da adeptoj kaj centoj da temploj, post 15 jaroj da karcerantaŭnelonge liberigis je ordono de sia rivalo Hiro-Hito, posteulo de Amaterasu "Dino de l' Suno"...

Tio ne estas orienta fabelo, sed aktualajo kiu tuŝas nin, Esperantistojn; ĉar Deguči estas esperantisto eĉ esperanto-verkisto! Kune kun cent ĉefdisciploj li lernis la internacian lingvon en 1923 kaj komencis propagandi Esperanton en grandioza maniero: multmiloj da Oomoto-anoj lernis nian lingvon, centmiloj ĝin simpatiis pro daŭra propagando en dekoj da multlegataj periodaĵoj de la sekto.

Kiam fondiĝis "Universala Homama Asocio", Esperanto estis ĝia oficiala lingvo, kaj en la Oomoto-centro, en Kameoka, aperis regule tri ampleksaj periodaĵoj kaj multaj verkoj en Esperanto! Tie, en la Esperantofako de la moderna Oomoto-presejo konstante laboris pli ol dudek laboristoj... ĝis la japana polico arestis Deguči kaj per dinamito eksplodigis la ĉefajn templojn...

Nun Majstro Deguči estas denove libera, reakiris siajn valorajn posedaĵojn kaj vastajn bienojn. Ni esperas, ke malgraŭ siaj 74 jaroj, li restis sufiĉe "verda" por repreni sian por-esperantan agadon!

El "Flandra Esperantisto", Januaro-1946).

O Esperanto no estrangeiro

ARGENTINA — Sob a direção do Sr. W. M. Goodes, presidente da "Rosaria Esperanto-Asocio", realizou-se o "Seminaria Kurso" de Esperanto.

O relatório apresentado na Assembléa Geral dessa associação, realizada em Dezembro último, mostrou um saldo satisfatório, que prova o progresso da mesma nos últimos tempos.

BÉLGICA — A secção belga da "Fédération Espérantiste du Travail" reuniu-se em congresso, no mês de Setembro último, em Bruxelas. O congresso resolveu acelerar a união dos esperantistas residentes na Bélgica. As primeiras diligências serão para a união dos trabalhadores esperantistas flamengos e valões.

BULGÁRIA — Começou a publicar-se a revista "Internacia Kulturo", em substituição ao "Bulgara Esperantisto". Magnífica revista, com muitas ilustrações. Os esperantistas búlgaros tiveram seu 28.º congresso, realizado em Sofia, de 2 a 4 de Setembro. Após o congresso fundaram-se dez novas sociedades esperantistas.

A "Bulgara Esperanto-Asocio" expôs à venda a 3.ª edição do Lernolibro de Esperanto, organizado segundo o método do engenheiro soviético S. Rublen.

DINAMARCA — Nos últimos meses foram fundados numerosos cursos de Esperanto. Faleceu o antigo esperantista H. J. Bulthuis, nascido em 1865, lingva komitatano desde 1907. Publicou várias obras em Esperanto, originais e traduzidas.

ESCÓCIA — Surgiu nova revista esperantista — "Skotlando vokanta". Dá notícia do 40.º congresso esperantista escocês, em Kimarnock.

EGIPTO — Reapareceu "La Egipta Esperantisto", órgão da E. E. A. do Cairo. Cresce o movimento esperantista nesta cidade e em Alexandria. Estudantes da Universidade frequentam cursos.

ESTADOS UNIDOS DA AMÉRICA DO NORTE — O professor Frank Tomich, de Cleveland, Ohio, em suas preleções a seus alunos das línguas alemã, francesa e espanhola, sempre inclui o estudo da língua Esperanto e do seu movimento no mundo.

Numerosos cursos de Esperanto têm sido fundados nos Estados Unidos. Nota-se pelas notícias do "American Esperantist" que progride o movimento de propaganda — conferências, artigos na imprensa, etc.

FINLÂNDIA — Em três meses adquiriu IEL oitenta novos membros havendo delegitoj em mais de 20 cidades. O Esperanto-Instituto tem feito realizarem-se preleções e conferências em vários pontos do país.

FRANÇA — Após tantos anos, reapareceu o interessante "Franca Esperantisto", órgão oficial da antiga "Société Française pour la Propagation de l'Espéranto", que agora se transformou em "Union Esperantiste de France et des Colonies", com a reunião de todas as associações esperantistas da França, então independentes, à S. F. P. E. A "Franca Kroniko", que inserem todos os números do "Franca Esperantisto", mostra o trabalho fecundo que estão produzindo em seu país.

"Do editorial "Au travail!", de Maio-Junho 1945, traduzimos os seguintes trechos: "Temos a convicção de que aqueles amigos que ainda estão isolados virão também reforçar o nosso movimento. En-

PRINTEMPO KAJ AMO

De *Eliška Krásnohorská*

La printem' — misnomas vi
de l'amad' belhorojn;
sed aŭtune trovas ni
de la tomb' en asoci'
ankaŭ amo-florojn.

La printempo kun malfru'
por tempeto venas:
vera am' en momentflu'
venas kaj neniam plu
nin forlasi penas.

El la ĉeĥa lingvo
esperantigis *F. V. Lorenz.*

ŜANĜITA SORTO

(*Egipta popolkanto*)

Feliĉa kiel reĝ' najbaro mia estis;
sed kiam kontraŭ li la sort' sin manifestis,
li eĉ en sia domo sen amikoj restis,
kaj kiam lia ŝip' fornaĝis por alporti
la kuracilojn, ve! — piratoj ĝin arestis.

El la araba lingvo: tradukis *F. V. Lorenz.*

tão, todos, lado a lado, por uma ação poderosa e coordenada, tentaremos remover os obstáculos que impedem nossa marcha para a frente. Mas para isso é preciso antes de tudo tomar consciência de nossa força. O Esperanto não é uma empresa pueril e divertida. É alguma coisa de prático, de racional, de lógico, que deve impor-se um dia ao mundo inteiro. Não temos o direito de ser tímidos a este respeito. A opinião de homens de valor e de corporações sábias deve proporcionar-nos a mais completa confiança.

"Trabalhemos, pois, ativamente e com paixão. É preciso que o Esperanto seja oficializado, o mais breve possível, como é o Código Morse. Sejamos antes de tudo práticos, e fiquemos de acôrdo sobre o primeiro fim a atingir. Isto não impedirá que os idealistas de nosso meio pensem ao mesmo tempo em nobres concepções humanitárias. Para a realização de nosso programa, deveremos ter o auxílio de uma centena de pessoas capazes de garantir determinado trabalho, algumas horas por semana. Mas nada podemos fazer sem dinheiro. Para atingir os fins de nossas propagandas é necessário que tenhamos numerário.

"Por proposta dos Srs. Dubuisson e Laffon, vamos imediatamente organizar uma Caixa de propaganda destinada a fornecer a quantidade de que precisamos. Encontraremos mil pessoas que nos forneçam cada uma 1.000 francos? ou então 10.000, a 100 francos? Receberemos donativos de sociedades, produtos de festas, bailes, subscrições, vendas comissões, etc.? Por que não? É um milhão que desejamos receber, durante os dez próximos meses. A cada um cumpre fazer o seu dever. Cada subscritor de pelo menos 1.000 francos receberá um diploma de "Benfeitor do movimento esperantista", atestado de que ele cumpriu seu dever,

em momento decisivo da história de nosso movimento esperantista".

Isto é animação e coragem!

HOLANDA — O Esperanto tem tido grande surto de progresso, depois de terminada a guerra mundial. De Maio a Novembro de 1945 inscreveram-se cerca de 2500 membros na "Federacio de Laboristoj Esperantistaj", segundo seu excelente órgão "Laboristo Esperantista".

Realizou-se com pleno êxito, em Amsterdam, o primeiro congresso após a guerra, o 26.º, em Outubro, no qual foram estabelecidos novos planos a favor do Esperanto. HUNGRIA — "Literatura Mondo", a conhecida editora da revista literária do mesmo nome, e de obras esperantistas de valor, recomeçou a funcionar. Entre seus redatores contam-se Kalocsay, J. Baghy e Tottsche. Bela notícia para os esperantistas. Enderêgo provisório do administrador: Béla Bleier, Pestrzentlorinez, Hargittastr. 10-Hungria.

INGLATERRA — "Esperanto Internacia", órgão oficial da "Internacia Esperanto-Ligo" voltou a circular mensalmente, e declara que, além de órgão oficial de IEL, é de seu programa tornar-se também periódico noticioso e literário, "unuvaranga".

MARROCOS — A União dos Sindicatos de Marrocos aprovou unanimemente a resolução que exige seja o ensino de Esperanto introduzido em todas as escolas.

SUÉCIA — Recomeçaram muitos cursos em algumas cidades. Em Goterg funcionam cursos em 4 escolas populares. Em Karlskoga, "Vere verda urbo", seguem cursos nas escolas primárias cerca de 100 crianças.


SUIÇA — Fundaram-se novos cursos, entre os quais, o "Esperanto-Klubo Migrema Stelo", em Rheineck, que organizou uma exposição de propaganda e preleções sobre o Esperanto.

Atestoj pri lernado

Ricevis la Ateston pri Lernado la jenaj geesperantistoj: F-ino Magnólia de Lima, F-ino Juranci de Almeida. S-ro Aurélio Cesar dos Santos, F-ino Vitória Régia de Lima, F-ino Olinda da Silva Barros, S-ro Estevam Fernandes Moreira, S-ro José Francisco de Lima, S-ro Helianto de Siqueira Lima, S-ro Pareci de Siqueira Lima, S-ro José Carlos dos Santos kaj F-ino Rossine Lopes da Fonte, pere de "Associação Esperantista do Rio de Janeiro"; F-ino Ignez Rocha, F-ino Maria Helena A. da Silveira, S-ro Joaquim Mendes da Rocha, F-ino Neuza Almeida Lopes, F-ino Clélia da Silveira Muniz, S-ro Ludwig M. Santos kaj S-ino Maria de Lourdes Maia Marinho, pere de "Brazila Klubo Esperanto"; S-ro Washington Luiz do Vale Pereira, S-ro Valmy Bittencourt, F-ino Irene Kreiling, S-ro Dylton do Vale Pereira, S-ro Hélio Joaquim Alves, S-ro Werner Springmann kaj F-ino Maria Sprin-

gmann, geanoj de "Esperanta Klubo de Florianópolis"; F-ino Yolanda de Araújo Costa, F-ino Nancy Cassão de Castro, S-ino Edith Montarroyos de Moura Costa, D-ro Alcides Neves Ribeiro de Castro, F-ino Laura Rebelo de Carvalho, S-ro Manoel Barbosa de Melo, S-ro Alfredo Moreira Agra, F-ino Irene Rebelo de Carvalho kaj F-ino Dalva Alves Farias, de la kurso ĉe la *Brazila Spiritisma Federacio*; F-ino Mercêdes Bravo, D-ro Cesário E. Tavares, S-ro Bernard Roseblatt, F-ino Rosa Bellon, S-ro Dante Palagi, F-ino Cynira Gomes da Silva, S-ro Elídio Taveiros, S-ro Carlos Poledna, S-ro Edwaldo Ferreira, S-ro Walter Plaza, S-ro Gilberto Marchetti Machado, S-ro Paulo Amorim Cardoso, S-ro Domingos Rodrigues Jardim, F-ino Nair Serrano Ganda, F-ino Wolfanga Baraldi, F-ino Olga Soares, S-ro Santiago Oliva, S-ro Antônio Pedro Pagnota, S-ro Antônio Rodrigues Paes, F-ino Olinda Serrano Ganda, F-ino Cleonice Gomes da Silva, S-ro Osvaldo de Faria, F-ino Branca Bellon, S-ro José Poledna, S-ro Pedro Meliani, S-ro Mário Orlando, F-ino Maria Elizabeth F. Ozório, S-ino Celeste S. Azevedo, F-ino Ashajanan Flora Esteves Abany, S-ro Humberto Parise, F-ino Daisy Rossi, S-ro Oldemar Panaroni, F-ino Yvonne Tessuto, S-ro Sebastião Manoel Francisco da Silva, pere de *S. Paulo Esperanta Klubo*.

Ricevis ankaŭ la Ateston pri Lernado post ekzameno farita per korespondado la jenaj geesperantistoj: F-ino Nilce Gripp Tardin, el *Cantagalo*; F-ino Lacyr Schettino, el *Barra Mansa*; D-ro Luiz de Azeredo Coutinho, S-ro Wilson Veado kaj S-ro Allan Kardec A. Costa, el *Belo Horizonte* kaj S-ro Carlos H. Dionísio, el *Foz de Iguaçu*.



Fotaj aspektoj de la solena kunveno ĉe la Esperanto-Klubo de la Kristana Asocio de Junuloj en Rio-de-Janeiro, je la 13a. de Januaro 1946, por inaŭguro de novaj kursoj kaj disdono de diplomoj al la kursintoj. Ĉe la honortablo vidiĝas la eminenta brazila filologo Prof. José Oiticica, kiu prezidis la solenaĵon kaj faris belan prelegon por Esperanto; Prof. Roberto das Neves, prezidanto de la Esperanto-Klubo kaj instruisto de ties kurso; D-ro Tibor Sékelj, ĝenerala sekretario de la Argentina Esperanto-Ligo, kiu salutis la gekursontojn kaj gekursintojn je nomo de la argentina esperantistaro; Haroldo Leite Pinto, reprezentanto de la Associação Esperantista do Rio-de-Janeiro; kaj Antônio José Vaz, kiu oratoris kiel ĉefdelegito de I. E. L.

DIPLOMO DE PROFESORO APROBITA

Je la 18a kaj 25a de Januaro lasta, ĉe la sidejo de "S. Paulo Esperanta Klubo", faris ekzamenojn por la akiro de la Diploma de Profesoro Aprobata la jenaj esperantistoj: S-roj Geraldo de Azevedo, René Ventura Sales, Francisco Demacq Rosas, Newton Ceratti kaj Carlos Souza Pinheiro.

TUTMONDA ADRESARO

S-ro Hugo Steiner, en Vieno, intencas eldoni en 1946, kiel antaŭ la milito, "Tutmondan Adresaron". La personoj kiuj deziras publikigi siajn adresojn sin anoncu ĉe la redakcio de "Svisa Espero". Prezoj: enpresigo de la adreso — Sv. Fr. 1; kun samtempa mendo de la Tutmonda Adresaro — Sv. Fr. 2,50.

Presejo: Irmãos Pongetti.